

## LIBERPENSULA ANGULO

### Kial starigi liberpensulan frakcion en SAT?

„SAT celas... helpadi al kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni k prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn k sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso k forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo k kulturo." (El la 1-a paragrafo de la Statuto.).

Same kiel socialismo, pacismo, anarkismo k aliaj ismoj, liberpensismo estas unu el la vojoj kondukantaj al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo k kulturo. Liberpensulo estas inter la plej toleremaj homoj, ĉar li asertas firme nenion, krom tio kio estas al li komprenigata per rezonado, de la Racio. Se li estas netolerema kontraŭ la religianoj (ne kontraŭ la dianoj!), tio okazas nur ĉar tiuj lastaj estas netoleremaj, k li aplikas nur la vortojn de Volter (Voltaire): „Estu toleremaj, escepte kontraŭ netoleremuloj!"

La religianoj estas esence kontraŭuloj de demokratio, ĉar ili volas starigi teokration, t.e. politikan reĝimon en kiu la pastroj regas kiel reprezentantoj de Dio! La kontraŭreligia agado de la liberpensulo estas do ankaŭ agado socia, ĉar ne eblas eduki, rezoni, racie pensi, kie la pastroj estas mastroj. Kaj kie ili tiaj ne estas, il penas fariĝi tiaj. Ni citu ekzemple nur:

En **Jugoslavio** marŝalo Tito per oratoraĵo kulpigas la vatikanon subfosi la pozicion k la interesojn de Jugoslavio en ĉiuj landoj, al kiuj la ŝtato petas helpon bezonatan.

En **Ĉeĥoslovakio** la papo sendis leteron al la katolikoj de tiu lando kun celo ilin ribeligi kontraŭ la registaro, pretekste ke ĝi reprenis el la Eklezio parton de ĝiaj privilegioj.

En **Svedio** la romaj kongregacioj instaliĝis ĵus, kvankam tie estas nur 16 mil katolikoj*).

En **Francio** la Eklezio profitante la apation de l' laikoj, sukcesis voĉdonigi leĝon, kiu donas ŝtatan subvencion al ĝiaj lernejoj, kie oni lernigas al la infanoj blinde obei la mastrojn... k kateĥismon.

Ni ne citas Portugalion k aliajn landojn, kie la Eklezio jam sukcesis preni la tutan povon! Necesas do ĉiam vigle kontraŭbatali la dogmon, la religion, por la fina triumfo de l' racio.

La religianoj ne subtaksis esperanton k ĝin uzas. Ni ne povas diri samon, ĝis nun, pri la liberpensuloj, ĉar liberpensaj esperantistoj ne sufiĉe atentigis pri la utileco de esp-o en niaj medioj, k unue en niaj nacilingvaj asocioj.

Ni ne volas akceptigi al vi iun kredon: Kredu nenion, pripensu ĉion, k neniam estu certa pri la absoluta vereco de via vidpunkto. Ateisto ne estas dikredanto; sed ĉiu liberpensulo ne estas devige ateisto. Pri tio ni aŭdu Viktor Hugo. Li skribis en sia testamento: „Mi kredas al Dio." Sed li aldonis: „Mi malakceptas la funebran paroladon de iu ajn Eklezio", ĉar li estis liberpensulo. Kiel tia li esperis en pli bona socio.

„Jes, socio kiu allasas la mizeron, religio kiu allasas la inferon, homaro kiu allasas la militon, aspektas al mi malsuperaj socio, religio, homaro, k mi sopiras al supera socio, al supera homaro k al supera religio: socio sen reĝo, homaro sen landlimoj, religio sen libroj. Jes, mi kontraŭbatalas la pastron, kiu vendas la mensogon, k la juĝanton kiu eldiras maljustaĵon." (Letero al Lamartine, la 24.6.1862, citita laŭ libro Viktor Hugo, la homo k lia verko, de P. Souchon).

Starigante liberpensulan frakcion ĉe SAT, ni helpos al la tutmonda laboro de la liberpensuloj, per esperanto. Samtempe aliĝos novaj anoj el tiuj medioj al esp-o k al SAT, ebligante ĉiam pli grandan proksimiĝon de la homaro al nia idealo.

*A. Gay (21.428)*

*) Sciigoj ĉerpitaj el „La Ekleziaĉo".

**La Jarlibro estos ekspedata dum januaro. Kotizpagante ne forgesu, ke aperos bele ilustrita kajero de SENNACIECA REVUO kun tre varia enhavo!**

## Eĥoj el Usono

Plej multaj usonanoj vere bedaŭras la proponitan ekzamenon al Ĉarli Ĉaplin, kiam li intencos reveni al Usono el Eŭropo. Reakciulo, prokuroro Mak Greneru, volas gajni prestiĝon k ekspluati la antaŭjuĝon kontraŭ la fama komediisto pro lia rifuzo fariĝi usonano, pro proceso kontraŭ li, en kiu virino diris, ke li estas la patro de ŝia infano, k ĉefe pro lia monhelpo al organizoj regitaj de la usona kompartio. Fakte li neniam en siaj pledoj por paco menciis pri sovet-imperiista armeo, k dum milito li partoprenis en manifestacio organizita de kom. partio favore al „dua fronto". Artisto ofte ne komprenas politikon!

Nun post baloto venos nova prokuroro, k kredeble la afero estos forgesita. Intertempe lia lasta filmo „Limelight (Scenlumo) prezentiĝis tre sukcese k samtempe en du novjorkaj kinejoj. Progresemuloj ĉi tie hontas pri reakciaj oficistoj k la miskompreno, kiun ili estigas. *488.*

### *Sennacieca Vojaĝo-Servo por Gejunuloj*

Landaj k lokaj aktivuloj! Kursgvidantoj! Vi instigu k helpu la novulojn por aplikado k praktikado de nia lingvo. Vi preparu vojaĝojn alilanden por la plej lertaj, vi skribu al nia Vojaĝo-Servo proponante gastojn aŭ gastigantojn. Tion vi nepre faru antaŭ majo aŭ tri monatojn antaŭ la dato elektita por la vojaĝo. Vi petu la regularon k proponilojn de via landa Respondeculo aŭ rekte de la Centro: **P. Louis,** 96 rue de Nabécor, **Nancio,** Francio.

Por Britio: K-ino Prent, 27 Argyle Rd., *Ilford,* Essex.
Por Danio: K-do Magnus Jacobsen, Rydersvej 9, *Aarhus.*
Por Germanio: K-do Ed. Hertlein, Auenstr. 78, III, *München 13.*
Por Nederlando: K-do H. J. Beijne, v. Boetzelaerstr. 58, *Amsterdam.*
Por Svedio: K-do Y. Nilsson, Förvaltarvägen 20, *Enskede.*

## POSTKONGRESA *admono*

Jam kvar monatoj forpasis post nia lasta SAT-kongreso. Por ĉiuj partoprenintoj ĝi estas nun memoraĵo. Duseldorfo, tiu urbo kun belaj avenuoj k parkoj, signis ja la jubileon de nia Asocio. Ĝia elvoko vekas por ĉiuj, mi esperas, pripensojn. Ĉu ĉiu kongreso ne estas por ni okazo renkontiĝi k diskuti pri la vivo de nia organizo? Ĉu ĝi ne permesas al la aktivuloj vidi, ĉu la asocio antaŭeniris?

Ni devas bedaŭri, ke, pro diversaj cirkonstancoj: ĉefe pro ekonomiaj malfavoraj kondiĉoj, tro da membroj de nia sennacieca anaro ne povas travivi niajn kongresojn. Opinias mi, ke oni devas ankoraŭ pli bedaŭri, ke granda nombro inter la gekamaradoj, kiuj havas la ŝancon partopreni niajn kongresojn, fakte ne donas al ili tiun enhavon, kiun ni rajtus atendi. Tro da membroj amatore vizitas la laborkunsidojn, tro da membroj havas nenion por diri post la raportoj de la gvidantaro. Se oni esceptas la kromaĵojn (prelegoj, debatoj), dum kiuj ni vidis honestajn diskutojn (laŭ la nombro de partoprenantoj), ni preskaŭ hontas diri, ke nur 6 kamaradoj surgrimpis la podion por esprimi sian opinion rilate la tutjaran agadon de SAT. Ĉu vere ĉiuj aliaj konsistigas mutan tuton? Ĉu ĉiuj aliaj kiel stultigita ŝafaro havas nur la kapablon svingi la membrokarton por aprobi la raportojn? Mi ŝatus, ke gek-doj, kiuj havas ideon, sugeston aŭ kritikon por fari, ne hezitu, k per nia vivanta esperanto profitigu la ĉeestantaron, kiu, ne forgesu tion, havas tiun okazon **nur** dum la kongreso.

Mi eĉ ŝatus, ke k-doj, kiuj plene aprobas la raporton, klarigu ankaŭ, kial ili havas tiun senpekan opinion. Tion fakte ni ne sukcesas vidi dum SAT-kongreso! Serioza instanco de nia asocio, kongreso ne estas bagatelo; cetere la preparado de ĉiu kongreso, petu tion al eks-O.K.K.-anoj, estas giganta tasko, kiun ni vere stulte postulus, se la kongreso mem ne devus doni profiton al nia asocio k al ties membroj.

Kion faras OKK, ni ankaŭ devas fari sur alia tereno. Ni devas prepari la kongreson. Ni devas por tion fari serioze legi S-ulo-n k aliajn gazetojn, studi la raportojn, peti ideojn al klubanoj, kiuj ne povos ĉeesti, unuvorte ni devas nepre kunporti nian kontribuon.

Ne decas, ke gvidanto deklamu monologon antaŭ oscedantaj salonuloj, ne decas, ke ridinda proporcio da membroj (ofte la samaj) ludu la rolon de neŝatataj grumbluloj. Pasiveco estas malsano, kiun ni devas denunci kiel etburĝan sintenon. La gvidantaro de SAT, k ĉiuj membroj, devas atenti pri tiu negativa flanko de niaj kongresoj. Ĉiuj devas lukti kontraŭ tiu apatio. Se ni ne reagas rapide, ni ne plu rajtos moki la preĝejvizitantojn, kiuj rigardas la pastron pensante pri alia afero, sidas, genuiĝas, aŭ klinas la kapon sen scii ekzakte kial ili faras tiujn azenaĵojn. Ne necesas esti oratoro por konstrue labori dum kongreso.

*Sabrier (19.671)*